

BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

JANUARO-FEBRUARO 1955

N.º 490-491



PARÁ

En la insulo Me-
xiana, ĉe la delto
de la rivero Ama-
zono, norde de
Brazilo, abundas la
bovoj kaj mankas
ĉevaloj; tial, la
vakeroj rajdas sur
bovoj.

JANUARO-FEBRUARO 1955

N.º 490-491

49-a Jaro

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.

Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	70,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	150,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	250,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	750,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

POR LA KRISTNASKO KAJ LA NOVA JARO

Brazila Esperanto-Ligo ricevis grandan nombron da salutoj kaj bondeziroj por Feliĉa Kristnasko kaj Prospera Nova Jaro, per leteroj, kartoj kaj telegramoj, kiujn ĝi jam dankis korege, kaj reciprokis.

Inter la belaj kartoj estas notindaj pro sia originaleco tiuj senditaj de S-ro José Gomes Guarnieri, el Campinas, kaj D-ro Lincoln Martins Viana, el Belo Horizonte.

CONCURSO DE ESPERANTO ENTRE GINASIANOS

O tema para 1955 do Concurso de Esperanto entre Ginasianos de todo o Brasil é "A Inconfidência Mineira".

A Liga Brasileira de Esperanto dará aos interessados outras informações de que precisem.

E' dever das associações esperantistas e de cada esperantista individual colaborar para o êxito crescente desse importante certame, do qual depende decisivamente a divulgação do Esperanto no meio da mocidade e portanto o futuro da Língua Internacional.

DONACO

Kun plezuro ni anoncas, ke je la tria fojo Brazila Esperanto-Ligo ricevis mil kruzejrojn, por la laboroj de nia movado, kiujn donacis nia altestimata, sindonema esperantistino S-ino Zénite de Castro Santos, el Teófilo Ottoni, Ŝtato Minas Gerais.

Nian sinceran koran dankon!

BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

JANUARO-FEBRUARO 1955

N.º 490-491

A UNESCO E O ESPERANTO

A Conferência Geral da UNESCO, há pouco realizada em Montevidéu, aprovou importante Resolução a respeito da Língua Internacional Esperanto. Essa Resolução, cujo texto traduzido publicamos adiante, reconhece que os resultados atingidos pelo Esperanto na esfera das relações intelectuais internacionais e com o objetivo da aproximação dos povos correspondem aos altos fins e ideais da UNESCO.

Sob o aspecto do princípio firmado a Resolução reveste-se de extraordinária significação. Depois da primeira guerra mundial a Liga das Nações aceitara um Relatório em que se dizia que o Esperanto poderia vir a ter grandes consequências do ponto de vista da unidade moral do mundo se o seu emprego se generalizasse. E' indubitável a importância desse documento. Não se pode, todavia, deixar de notar a maneira condicional por que ele exprimiu o pensamento. A Resolução agora aprovada pela UNESCO não se exprime dessa forma. Ela simplesmente considera a Língua Internacional Esperanto como um facto social e declara que o trabalho dos esperantistas se harmoniza com o nobre ideal visado pela UNESCO.

Para bem avaliar o significado da Resolução é preciso atentar nas palavras «fins e ideais da UNESCO». Eis

alguns deles: defesa da paz por uma melhor compreensão entre os povos e pelo respeito aos direitos humanos; difusão da cultura e da educação; solidariedade intelectual e moral da humanidade; permuta de ideias, conhecimentos e pessoas; cooperação internacional no domínio da educação, ciência e cultura; supressão das dificuldades criadas pela diversidade de línguas; educação para a cidadania mundial; divulgação de obras clássicas e contemporâneas por meio de traduções; divulgação dos conhecimentos científicos; padronização de terminologias técnicas; facilitação da livre divulgação de ideias por escrito ou oralmente.

A Resolução significa, portanto, a declaração por parte da mais alta instância internacional em matéria de educação, ciência e cultura de que os resultados alcançados pelo Esperanto nos seus 67 anos de funcionamento prático contribuíram e contribuem para a realização de todas aquelas condições essenciais que conduzem à unidade da humanidade conjuntamente com o respeito às diferenças de raça, nacionalidade, religião, língua e outras.

Pela Resolução de 10 de Dezembro de 1954 é pela primeira vez oficialmente proclamado no plano internacional o valor educativo, científico e cultural da Língua Internacional. Nisso

A RESOLUÇÃO DA UNESCO SOBRE A LÍNGUA INTERNACIONAL

É a seguinte a tradução para a nossa língua do texto oficial da Resolução aprovada em 10 de Dezembro de 1954 pela 8.^a Conferência Geral da UNESCO, realizada em Montevidéu:

“A Conferência Geral, tendo discutido o Relatório do Director-Geral sobre a petição Internacional em favor do Esperanto:

1) registra os resultados atingidos pelo Esperanto no domínio das relações intelectuais internacionais e na aproximação dos povos do mundo;

2) reconhece que esses resultados correspondem aos fins e ideais da UNESCO;

3) incumbe o Director-Geral de acompanhar o desenvolvimento corrente no uso do Esperanto na educação, na ciência e na cultura, e, com esse escopo, cooperar com a Associação Universal de Esperanto nos assuntos concernentes a ambas as instituições;

4) nota que vários Estados-Membros declararam achar-se prontos a introduzir ou ampliar o ensino do Esperanto nas suas escolas ou estabelecimentos de educação de nível mais alto, e pede a esses Estados-Membros que mantenham o Director-Geral informado dos resultados obtidos neste campo.”

consiste principalmente a sua elevada significação que assinalará uma época na história cultural da humanidade.

Como esperantistas confessamos de público o nosso reconhecimento à Universal Esperanto-Asocio, que tão proficientemente soube encaminhar a relevante questão, e ao seu eminente Delegado, o Prof. Ivo Lapenna, cuja inteligência, dedicação e competência puderam levar a êxito feliz e árdua missão junto à UNESCO. E como brasileiros manifestamos o nosso apreço à Delegação do Brasil, chefiada pelo ilustre Prof. Paulo Carneiro, que deu o seu voto favorável à Resolução, em perfeita coerência com as anteriores manifestações do nosso Governo em relação ao Esperanto.

A Liga Brasileira de Esperanto sente-se jubilosa ao dar, no primeiro

número do B.E. do novo ano de 1955, esta auspiciosa informação aos seus leitores. Concita os esperantistas a darem o melhor do seu esforço no cumprimento das graves responsabilidades que impendem ao nosso movimento ante a Resolução da UNESCO.

C. D.

EDZIGO

Je 9 de Decembro pasinta geedziĝis niaj samideanoj Wladimir Simão da Silva, plenumsekretario de B.E.L., kaj F-ino Alzira J. da Silva.

Ĉe la sidejo de B.E.L., kelkaj samideaninoj aranĝis gratulan kunveneton kaj lunĉon, kun la ĉeesto de samideanoj kaj de la geedza paro.

PROF. IVO LAPENNA

Returne de Montevideo, kie li brile reprezentis la esperantistan movadon ĉe la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiel observanto de UEA, alvenis al Rio de Janeiro, en la 21-a de Decembro, veturante per la vaporŝipo *Highland Princess*, nia eminenta ŝanfidano Prof. Ivo Lapenna.

kribis la sinsekvon da laboroj por Esperanto en la Montevidea Konferenco, la preparon por la partopreno de UEA, la organizon, la inaŭguron kaj grandegan sukceson de la 1-a Universala Ekspozicio de Esperanto, la sindoneman kunlaboradon de la Urugvaja Esperanto-Societo, la dramajn okazaĵojn, kiujn prezentis la diskuto pri la temo Esperanto, kaj fine la decidon de UNESKO, la plej alta instanco por eduko,



La inaŭguro de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto. Dum la kantado de la «Espero» ĉiuj staris. En la unua vico de dekstre S-ro L. Elvin, Direktoro de la Eduka Departemento de UNESKO, kaj Prof. J. Thomas, Direktoro de la Kulturaj Aktivecoj. En la centro S-ino Datoo Toemenggoeng, prezidantino de la Indonezia Esperanto-Asocio.

Ankoraŭ surŝipe, salutis lin D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de BEL, S-ro Ismael Gomes Braga, Vicprezidanto, F-ino Irani Baggi de Araujo, Kasistino, kaj Prof. J. B. Melo e Sousa.

Dum interparolado ĉe la salono de la ŝipo, la klera vojaĝanto detale pris-

scienco kaj kulturo en la mondo, kiu agnoskis la valoron de nia lingva afero.

La februara n-ro de *Esperanto* publikigos la raporton prezentitan de Prof. Lapenna pri lia lerta, energia agado en Montevideo. En ĉi tiu numero ni donas la tekston de la rezolucio akceptita.

Malgraŭ la mallonga tempo, dum kiu restis la ŝipo en nia haveno, Prof. Lapenna estis intervjuita de la potencia radiostacio Rádio Globo, kaj respondis interesajn demandojn faritajn de la radio-reportero S-ro Rubens Amaral. Prof. Melo e Sousa estis la interpretanto. Okaze de la foriro de la ŝipo aliaj esperantistoj salutis Prof-on Lapenna.

Al nia brava samideano ni refoje esprimas varmajn salutojn pro la bela triumfo, kaj sincerajn dankojn de la brazilaj esperantistoj, pro la grava servo, kiun li faris al la Esperanta afero.

1-a KONVENCIO DE LA ESPERANTISTOJ DE LA STATO RIO DE JANEIRO

Signifoplena manifestado de la Ĝenerala Kunsido de Conselho Nacional de Estatística

Dum sia XIV-a Ordinara Kunsido en Julio 1954 la Ĝenerala Kunsido de la Nacia Konsilantaro de Statistikoj de Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistikoj aprobis unuanime la Rezolucion sub n-ro 629, kiu, krom manifestisian ĝojon pro la okazigo de la 1.^a Konvencio de la Esperantistoj de la Ŝtato Rio de Janeiro, en Niterói, rekomendis la enmeton, en la Analoj de la Konsilantaro, de la parolado «O Idealismo e o Esperanto» farita de D-ro M. A. Teixeira de Freitas; kaj gratulis la iniciatintojn de la Konvencio. La proponon pri la Rezolucio faris S-ro Aldemar Alegria, Direktoro de la Departemento de Statistikoj de la Ŝtato Rio de Janeiro, kaj ĝia reprezentanto ĉe la Kunsido de brazilaj statistikoj.

APERFEIĈOE O SEU CONHECIMENTO

A PALAVRA

José de Alencar

A palavra, esse dom celeste que Deus deu ao homem e recusou ao animal, é a mais sublime expressão da natureza: ela revela o poder do Criador e reflecte toda a grandeza de sua obra divina.

.....
A palavra tem uma arte e uma ciência: como ciência, ela exprime o pensamento com toda a sua fidelidade e singeleza; como arte, reveste a ideia de todos os relevos, de todas as graças, e de todas as formas necessárias para fascinar o espírito.

O mestre, o magistrado, o padre, o historiador, no exercício do seu respeitável sacerdócio da inteligência, da justiça, da religião e da humanidade, devem fazer da palavra uma ciência; mas o poeta e o orador devem ser artistas, e estudar no vocabulário humano todos os seus segredos mais íntimos, como o músico que estuda as mais ligeiras vibrações das cordas de seu instrumento, como o pintor que estuda todos os efeitos da luz nos claros-escuros.

O trecho aqui publicado, cuja tradução virá no número seguinte, é do autor de *Guarani*, *Iracema*, *Senhora* e muitos outros trabalhos de valor.

**KONSTANTE PORTU LA VERDAN
STELON !**



Brazila Kroniko

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — La radiostacio «Rádio Nordeste» disradias interesan programon «Glória de uma vida». Unu el la gloraj vivoj, kiun S-ro Moacir Melo enmetis en sian ŝatatan programon, estis tiu de d-ro L.L. Zamenhof, kies plej elstarajn vivajn epizodojn S-ro Melo elektis por fari belan dissendon.

La samideanaro dankas la Radiostacion, S-ron Melo kaj liajn helpantojn, kaj la protektanton de la programo, Costa Neto & Cia.

PARAÍBA

João Pessoa — Associação Tabajara de Esperanto ne forgesis la memoringan tagon 15 de Decembro. Inter aliaj solenaĵoj, oni inaŭguris la «Straton Esperanto» kaj la «Someran Esperantan Domon», en la ĉarma plaĝo Tambaú.

Poste ni pli detale informos pri tiuj okazaĵoj.

PERNAMBUCO

Recife — Associação Pernambucana de Esperanto feste solenis la naskigan daton de nia Majstro, per ampleksa semajna programo kaj ekspozicio de esperantaĵoj.

Petrolina — Nia samideano Nelzito Santos daŭrigas elementan kursón, kaj intencas fondi grupeton kaj pere de la Radiostacio Juazeiro fari propagandajn dissendojn.

BAÍA

Salvador — Por la ekspozicio de urbdomaj vidaĵoj, pri kiu ni informis en nia septembra-oktobra numero, Inĝ. Jaddo Maciel skribis al ni, ke li jam ricevis vidaĵojn el 22 landoj. Sed el multaj Brazilaj urboj kaj kelkaj ŝtataj ĉefurboj li ankoraŭ nenion ricevis!

Ilhéus — Ilhéus Esperanta Grupo celebris la 67-an datrevenon de la apero de la unua Esperanta verko per festa kunveno, kiun prezidis D-ro Wilson Rosa, advokato. Paroladis nia samideano Luciano Araujo. Al la ĉeestantoj oni disdonis la bultenon «Kial oni devas lerni Esperanton», de S-ro Eléus Leonardo de Sá, prezidanto de I.E.G.

STATO RIO DE JANEIRO

Macaé — Sub la aŭspicio kaj laŭ invito de la Esperanto-Klubo de Macaé, pere de ĝia prezidanto Wanderley da Silva, nia fervora samideano, vizitis tiun urbon, la 18-an de Decembro, la fama verkisto Malba Tahan — Prof. Julio Cesar de Melo e Souza. Lin akceptis la elito de la loĝantoj de tiu agrabla, pitoreska, apudmara urbo, alnomita de kelkaj — «la Atlantika reĝidineteto».

Post promenoj tra la urbo, en la salonego de la Komerca Asocio faris Malba Tahan tre aplaŭditan paroladon.

Urbo Macaé ŝuldas al Esperanto la favoran cirkonstancon ricevi la vizi-

ton de la aŭtoro de la verko «La Kalkulanta Viro» kaj multaj aliaj.

SÃO PAULO

São Paulo — Kiam en la pasinta Novembro estis kelkajn tagojn en São Paulo, D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, profitis la okazon por kontakti kun la direktantaroj de São Paulo Esperanta Klubo kaj Interfrata Esperanta Klubo, kaj pritrakti aferojn rilate la disvolviĝon de la E-movado en tiu grava ĉefurbo. Li akorde agis precipe kun nia sindona samideano Horácio Pereira dos Santos, Prezidanto de SPEK kaj Viceprezidanto de IEK, speciale pri la necesaj paŝoj por la starigo de E-kursoj kaj liverado de diplomoj.

Santos — Memorige de la 95-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof, Centro de Cultura e Irradiação Mental Tatwa Paulino Penin de Campos okazigis en la 16-a de Decembro, en sia sidejo, specialan kunvenon.

Parolis: pri la personeco kaj la laboro de D-ro Zamenhof nia samideano José Vaz Pereira da Silva; kaj nia samideano Lauro J. Costa pri la interna ideo de Esperanto.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — La 30-an de Novembro 1954 la Sociedade Mineira de Esperanto, dum festa kunveno ĉe la Klubo de la Bankoficistoj, disdonis atestojn al 103 lernantoj, kiuj finis la «Kompletigan Kurson» faritan en la Escola de Esperanto, de S.M.E.


Brazila Esperantisto gratulas la novajn samideanojn, kaj esperas ke ili fariĝu, ne nur supraĵe, sed ĝisfunde veraj esperantistoj, kaj do aliĝu al Brazila Esperanto-Ligo (BEL), la landa asocio por Brazilo, kaj ankaŭ al Universala Esperanto-Asocio (UEA), «la sola internacia organizaĵo, kiu sin okupas nur pri la progresigo de Esperanto».

Barbacena — S-ro Albertino Alves de Almeida, instruisto pri la angla lingvo, aranĝas elementan Esperanto-kurson, en tiu bela urbo de Minas Gerais. Ek al laboro!

Tupaciguara — Laŭ sciigo de nia amiko J.C. Machado, Tupaciguara Esperanto-Klubo inaŭguris, la 15-an de Decembro, ekspozicion de esperantaĵoj ĉe la Foto-Saul. La Klubo presigis flugfoliojn propagandajn, kun invito viziti la ekspozicion.

RIO DE JANEIRO (Federacia Distrikto)

Dum solena kunsido, la 22-an de Novembro, Associação Brasileira de Educação (Brazila Asocio de Edukado) transdonis la diplomon de Honora Membro al la klera brazilano D-ro Mário Augusto Teixeira de Freitas. La oratoro, admiralo Adalberto Meneses de Oliveira, citis la grandajn servojn faritajn de nia eminenta samideano al nia lando, kaj ankaŭ menciis lian konstantan, entuziasman laboron favore de Esperanto. Brazilian Esperanto-Ligon reprezentis en la soleniĝo D-ro Carlos Domingues, Prezidanto, D-ro Mário Ritter Nunes, 1-a Sekretario kaj F-ino Irani Baggi de Araújo, Kasistino.



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros
e Albuquerque, Viriato Correia**

XII

KRIMINALAJ TEORIOJ

Eneas Cabral, kiu piedstare estis rigardinta ĉe la enirejo la finon de tiu sceno, tiam sin prezentis. F-ino Rosa sentis agrablan surprizon vidante lin.

— D-ro Cabral, mi petegas, vi, kiu min konas, savu min, ili volas kredigi, ke mi estas krimulino!

— Sinjorino, trankviliĝu kaj sen ĉirkaŭfrazoj informu la juĝopovon pri ĉio, kion ĝi deziras scii. Tio estas la plej bona maniero malteksi la fadenfaskon, en kiu vi estas implikiĝanta.

— Mi rakontos, doktoro, mi rakontos ĉion, kion mi scias.

Kaj tiam, sin rearanĝante, per firma voĉo ŝi rakontis, kiel ŝi provis repacigi Cardoso, la fianĉon, kun la maljuna Sanchez Lobo, la onklo, kiu eĉ ne volis vidi lin. La du estis tiel inklinaj, ke la definitiva rendevuo devis okazi ĝuste hieraŭ. Ŝercante, Cardoso diradis al ŝi, ke, se la maljunulo ne akceptus lin bone, li nepre gorgremus lin.

— Jes, jes, — ŝi respondadis al la ŝerco, — iru, ĉar nenio malbona okazos.

Hieraŭ, je la deka vespere, kiam li sin prezentis al ŝi hejme, ĉar estis fremdaj vizitantoj kaj ili ne povis konversacii sole, ŝi tamen ne forgesis demandi:

— Ĉu vi faris, kion vi promesis al mi?

— Jes... mi likvidis la maljunulon...

Ŝi ne plu parolis al li pri tio, ĝis la horo de la teo: tiam, kiam ŝi demandis, kia estis la akcepto, Cardoso korektis, ke li ne havis tempon iri al la onklo, kaj tial la rendevuo estis prokrastita al alia tago. Ĉirkaŭ noktomezo, kun la aliaj vizitantoj, Cardoso foriris. Ŝi ne povas imagi, kiel

ĉe la emocioj de la aresto, por fari deklarojn, ŝi povis dubi pri la ŝerca karaktero de la informoj de la fianĉo. Tamen ŝi povas certigi, ke inter la 10-a kaj la 11-a kaj 55 minutoj vespere li ne povis esti murdinta iun tial, ke li estis en ŝia societo kun tiuj kaj tiuj personoj, kiujn ŝi citas.

La tono de la rakonto estis tiel sekura kaj firma, ke la konvinko estis preskaŭ ĝenerala pri la sincereco de la junulino. Sed Melo Bandeira ne kapitulacis:

— La rakonto estas tre bone forĝita, sendube, sed vi forgesas, ke estas ĉi tiu letereto kontraŭanta al ĉio tio...

Kaj li elmontris, malfermitan kaj videblan, la fatalan letereton, la grandegan eltrovon de sia lanterno.

F-ino Rosa rigardis komence kun surprizo, poste kun trankvilo, kaj fine kun malŝato:

— Nure ĉi tiu letereto ne estis skribita de mi, nek adresita al ĉi tiu Petro. Petro kaj Rosa ne ekzistas nur du, ni du, en ĉi tiu mondo.

— Vi estas kuraĝega! Vi do rezistas al ĉi tiu evidenteco?

— Majoro, se krom via lanterno vi havas komunan saĝon, vi povas informiĝi, ĉu tiu skribkaraktero estas mia, aŭ ne...

Fakte, la argumento estis decidiga. Bandeira serĉis nun, kiel li pruvas la identecon de la skribkaraktero, kaj tiam Cardoso, jam retranskribinta, memoris, ke li havas en la poŝpaperujo kelkajn liniojn skribitajn de la fianĉino. Antaŭ la aŭtoritatulo f-ino Rosa estis skribinta kelkajn frazojn: ĉe la komparo kun tiuj de la papero, kiun la kuracisto liveris, la simileco estis absoluta: male, la letereto trovita de Majoro Bandeira havis neniun similecon kun tiuj karakteroj. Antaŭ la evidenteco Melo Bandeira falis ŝajne senviva sur sian brakseĝon. Oni eĉ pensis pri sveno.

F-ino Rosa, volvante la harojn, kiujn nur tiam ŝi ekvidis malligitaj, rigardis lin kun kompto kaj aldiris:

— Majoro, konsilon... Ne sufiĉas, por esti detektivo aŭ ŝerloko, nur lanterno, estas necese, unue ,havi simplan saĝon. Ĉar ĉi tiu estas malfacile akirebla, lernu iom da grafologio, da mandiveno, lernu

la kartdivenon tial, ke la ludkartoj eble estos utilaj al vi por viaj policaĵaj eltrovoj.

En la emocio de sia venĝo la junulino estis kruela. Ŝi sin rearanĝis ĉe la spegulo de la delegito kaj kun la pardonpetoj de D-ro Cabral foriris en la societo de Cardoso kaj de Gregório, sia maljuna servisto, kiu el tio portis la bonan impreson, ke li estas gajninta, en la bestoj-ludo, kion li ankoraŭ ne sciis. Naiva Joĉjo, la viro de la vertoĉapo, ankaŭ purigita el ĉiu suspekto, estis forliberigita kun ili.

Post kiam ili foriris, la helpa delegito ĵetis kompatan rigardon al la malfeliĉa Bandeira, malŝatata, ankoraŭ sur lia brakseĝo, kaj grave diris al li kaj al Lobato:

— Jen kion vi faris... Vi ne volis aŭskulti min... Ni estis nomintaj krimulon, prirespondulon, kiun ni trenus al la juĝantaro; kaj pro du mallertaj esploroj kaj pro la obstino rigardigi kiel kulpulon la nevon, sin forsavas de ni Naiva Joĉjo, Cardoso, F-ino Rosa. Ni devas rekomenci, ni devas trovi krimulon *ad hoc* tial, ke ne estas eble, ke la Polico ne havas unu, sub la mano... Jen kion vi faris...

D-ro Lobato, ĝojega, havis tiam sian momenton de triumfo:

— Pardonu, D-ro Cabral, ni havas la veran postsignaron, kiu estas la mia, la unua, la junulino alivestita kaj la junuloj ŝiaj akompanantoj. Mi jam venigis ŝin, de strato Paulino Fernandes...

— Eble por fiasko, la via, kiel estis nun tiu de Majoro Bandeira, — respondis la helpa delegito.

Post momento da pripenso la landa Javert religis la fadenon de sia parolado:

— Karaj amikoj. Antaŭ ol lerni la leĝosciencon, mi dediĉis min al la ŝaradarto. Vi scias, kio ĝi estas: la intereso de la ludo konsistas en tio, ke ni serĉas la solvon, kiu forkuras de ni; per tio ĝi nin retenas, rompas al ni la kapon, ĝis fine, *eureka!* ni ĝin trovas. Ĉi tie la problemo estas malsama. Oni donis al ni kiel deiran punkton solvon, kaj oni diris al ni: provu kunmeti la ŝaradon interesan, kvazaŭ premison de tiu konkludo. Kaj ni nin metis al la laborego, lacekonsumiĝante aŭ amuziĝante en la ludo, eble supozante amuzi tiun, kiuj nin ĉirkaŭas aŭ nin rigardas.


Anstataŭ kunlabori unuj kun la aliaj, ni estas embarasantaj kaj nuligantaj nin reciproke; tio rezultigos aferon seninterrilatan, malindan je nia polica kapableco. Senprudente D-ro Lobato senigis min je la viro de la vertoĉarpo, evidentigante lian senkulpecon; mi ĵus faris la samon al Majoro Melo Bandeira, likvidante Cardoson kaj plie f-inon Rosan. Mankas nur, ke nia kunulo liberigu de kulpo f-inon Lucindan, kiel repagon al S-ro Delegito. Per^d tiu agmaniero ni sukcesos nenion. Mankas al ni metodo. La malbono venis de la komenco. Kun antaŭa solvo ne estas iu ŝarado interesa aŭ amuza. La savrimedo konsistos en tio, ke ni serĉu ekstere tiun elementon de scivolo por veni post du monatoj al la kompleta sukceso.

Li haltis por ripozi kaj atakis alian specon da konsideroj:

— Vi prenas laŭlitere niajn funkciojn, se vi supozas, ke la Polico estas kreita por puni krimojn. Tio jam ne ekzistas en la nuna tempo: Materialaj punoj kaj karceroj eksmodiĝis. Tio, kio ekzistas nun, estas publikeco. Por kio gravas la absolvo ĉe la juĝantaro? La malfeliĉulo jam vidiĝis trenata tra kalvario, kalumniata kaj publikigata. La socio ne maltrankviliĝas pro pli aŭ malpli unu krimo punita; ĝi volas informajn, pikantajn detalojn, bone aranĝitajn kalumniojn, atestojn, akuzojn, senfundamentajn, falsajn, sed sensaciajn. Kiam ne estas eble fari tion al la krimuloj, la viktimoj pagu. La plej bona, kiun ni povas fari en la nuna situacio, la intereso ŝarado por la solvo, kiun oni donis al ni, konsistas en tio, ke ni malkaŝu la privatan vivon de Sanchez Lobo. Laŭ tio, kion oni informis al mi, ĝi estas la plej eksterordinara romano de aventuroj, kiun oni povas imagi. Mino, miaj amikoj!

En tiu momento iu leĝa persekutisto sin klinis antaŭ la delegito Lobato kaj diris:

— Jen estas la junulino de strato Paulino Fernandes, arestita hieraŭ, kun la junuloj, de la policisto 402!



Martinus — LA HOMARO
KAJ LA MONDBILDO — El la
dana originalo tradukis C. Graver-
sen — Eldono de La Spirit-Scienca
Instituto de Martinus — Esperan-
to-Sekcio — Kopenhago 1953 — 1
vol. 124 p. 12,5 x 19 cm., tole bind.

Antaŭ pli ol dudek jaroj Martinus komencis verkegon plurvoluman kun la titolo *Livets Bog* (La Libro de Vivo), el kiu jam aperis 5 volumoj kun la sumo de 2.250 paĝoj, kaj li nun preparas la sesan volumon. «La Homaro kaj Mondbildo» estas resumo de la instruoj donataj en la granda verko de la Aŭtoro.

La Aŭtoro estas profeto en la plej bona senco de tiu ĉi vorto kaj jam eldonis libreton kun la titolo «Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio».

Iel simile al Pitagoro en la jaro 532 a.K., li fondis skolon por altigi la homan spiriton kaj por bonigi la kutimojn per klara kompreno pri la vivo kaj la Universo. La libro prezentas bildon de la sidejo de «La Spirit-Scienca Instituto de Martinus».

La Aŭtoro instruas al ni la eternecon de la vivo kaj universalan solidarecon de ĉiuj estuloj; sekve la universalan amon laŭ Kristianismo kaj la reenkarniĝon laŭ diversaj spiritualismaj skoloj en ĉiuj tempoj ekde Brah-

Recenzo

manismo ĝis la tre moderna Spiritismo.
Mi kopias kelkajn liniojn de la Aŭtoro :

«Per plurfoja vivado sur la tero, en sfero de sufero, la estulo nobliĝas, evoluas pli kaj pli al altruisma kaj humana sinteno, kaj fine estas gvidata de perfekta homamo. En la estulo evoluas organoj de simpatio kaj amo, kiuj iom post iom levas lin super la sferon de besto, kaj igas lin kapabla por amisian proksimulon, egale, ĉu tiu estas samseksano aŭ el la alia sekso. Aperas nova psiko, nova idearo, kiu iom post iom forŝovas el la tera homo la bestan sinaman idearon. La plej elstara esenco de tiu nova idearo estas humaneco kaj amo al ĉiuj kaj ĉio». (P. 107).

El la paĝo 114 mi kopias:

«Tiu abundega sento de beato, kiu akompanas la di-spirititan iluminon kaj plenigon de la konscio, estas tiom forta, ke en malpi ol unu sekundo penetras en la konscion tiom da lumo, ke sentiĝas neeble akcepti pli.

«La ĉiela lumo malaperas, kaj oni ree estas sur la materia plano. Sed de tiam la inicito konscias en la penso kaj volo de la Patro. Li unuigis kun la Patro, kun la vojo, la vero kaj la vivo. Li vidas, ke ĉiuj vivantaj estaĵoj estas partoj el la sama vivo, ke ĉiu unuopa el ili estas Di-filo same kiel li mem».

El la paĝo 120 :

«*La organismo de vivanta estaĵo ja estas kreita, kaj pro tio nedaŭra. Sed ekzistas io, kio kaŭzas, ke la organismo ĉe sia finiĝo estas anstataŭigata de ia nova organismo, tiel ke la estulo neniam estas senorganismo. Krome la organismo estas kombino de diversaj ĉeforganoj, tiel ke unu el ili rilatas al fizikaj spertoj kaj manifestoj, kaj aliaj al spertado en la diversaj spiritaj aŭ psikaj kampoj. Kiam la fizika ĉeforgano, la materia korpo, mortas, la konscio tuj translokiĝas en la psikajn ĉeforganojn, por resti tie, ĝis nova fizika korpo estos kreita kaj povos transpreni la konscion. Kaj tiu procedo daŭras tra la alternaj fizikaj kaj spiritaj spertoepokoj. Tiuj alternantaj epokoj en la ekzistospertado de la estulo motivigas la nocion «reenkarniĝo» aŭ «renaskiĝo».*

La lingvon de la libro krontrolis la Literatura Komitato de S.A.T., kaj ĝi estas tre bona. Revizio perfekta: en la tuta libro mi nur trovis tri preserojn. Papero kaj preso bonegaj. Entute grava libro, kiun ĉiu serioza esperantisto devas posedi, legi, retralegi, kaj pripensi.

I. G. B.

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

30.VII - 6.VIII - 1955, BOLONJO, Italujo

Adreso: CIT, Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo.

Por la JUBILEA KONGRESO la L.K.K. prezentos la faman komedion de Gogol "La Revizoro" en traduko de Zamenhof. Teatra trupo de Bolonjo jam studas Esperanton kaj okupiĝas pri la roloj.

LA INTERNACIA LINGVO

(FAKTOJ PRI ESPERANTO)

Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo.

La Esperanto-organizaĵoj, iliaj celoj kaj laboroj.

U.E.A.: historio kaj laboro.

Redaktita originale en Esperanto de

D-RO IVO LAPENNA

Eksprofesoro en la Universitato de Zagreb

Honorofica Direktoro de Centro de Esploro kaj Dokumentado

1 vol. bind. Cr\$ 100,00

Libroservo de B.E.L

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

4.^a ediĉo, em formato reduzido

(14 x 10 cm.) Enc. Cr\$ 150,00

Ainda temos alguns exemplares da

3.^a ediĉo, formato 21 x 15 cm.

Enc. Cr\$ 150,00

Suplemento à 4.^a ediĉo


Br. Cr\$ 50,00

Serviço de Livros da B.E.L.

La bela Glumarko de la Jubilea Kongreso estas akirebla en folioj de po 25 maroj (ne 50 kiel ni anoncis) por 50 liroj, 1 rpk. aŭ 6 pencoj. Mendu senpere ĉe la kongreso aŭ per la Perantoj.

Statistiko (ĝis 31 dec.): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 4, Belgujo 10, Brazilo 3, Britujo 44, Danujo 19, Finnujo 4, Francujo 55, Germanujo 24, Hispanujo 4, Italujo 130, Japanujo 1, Jugoslavio 25, Kubo 1, Maroko 1, Nederlando 64, Norvegujo 16, Novzelando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 19, Svisujo 18, Urugvajo 1, Usono 4. Sumo, el 25 landoj, 452. (Nemembroj de U.E.A. 16%).

Bibliografio



DICIONÁRIO PORTUGUÊS-ESPERANTO. Compilado por *Ismael Gomes Braga*. Edição da Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Ltda. Rio de Janeiro, Brasil, 1954. 300 p. Preço: broŝ. Cr\$ 60,00, bind. Cr\$ 95,00, ĉe la Libroservo de B.E.L.

Ĉi tiu vortaro aperis en tre oportuna momento, ĉar estas elĉerpita la bonega vortaro portugala-esperanta de Couto Fernandes, C. Domingues kaj Porto Carreiro Neto, eldonita en 1936, kaj ĝia dua eldono, tre plibonigita de Porto Carreiro Neto, pro diversaj cirkonstancoj certe malfruiĝos.

Por la kompilaĵo Ismael Braga povis konsulti plurajn vortarojn, fakterminarojn kaj beletrajn verkojn en Esperanto, publikigitajn post 1936, kaj tial li havis elementojn por enmeti novajn terminojn kaj neologismojn necesajn. Sed, kiel de li menciite, li gvidis sin precipe per la citita vortaro portugala-esperanta, eldonita antaŭ 18 jaroj. Estas domaĝe, ke li reproduktis en la aktuala verko kelkajn eraretojn trovitajn en la vortaro de 1936, kiel ekzemple la Esperantan tradukon de la vortoj *bimensal*, *comporta*, k.a. Sed tio ne gravas, kaj lia verko certe bone helpos al la lernado de Esperanto en nia lando.

O DIÁRIO DO DR. SATAN — *Roberto das Neves*. *Comentários subversivos às escorrências cotidianas da sífilização cristã.*

272 p. Editora Germinal — Rio de Janeiro, 1954.

Anarkisma verko en portugala lingvo. Kolekto da renversemaj komentarioj, preskaŭ ĉiuj jam publikigitaj en diversaj gazetoj, ĝenerale pri la temoj: atako kaj kritiko kontraŭ ĉiuj religioj kaj doktrinoj, precipe la katolika, kaj kontraŭ la “paradizoj” soveta kaj ibera. Kelkajn paĝojn la aŭtoro dediĉas al nia lingvo. Unu el liaj devizoj estas: “Prefere insultata en Esperanto ol laŭdata en lingvo nacia”.

EKONOMIAJ FAKTOJ en dudek ok bildoj.

Kun klarigoj en Esperanto, montrante ke la mekanikigo, anstataŭ krizojn kaj militojn, donos al la homaro abundon kaj liberan tempon. Internacia Asocio Bellamy, Konigstr. 188, Beverwyk, Nederlando.

RÜDESHEIM — Prospekto kun bildoj de tiu vizitinda urbeto apud la Rejno, fama pro bonaj vinoj. Germana eldono, kun aldono en Esperanto.

VIZITU GERMANION — Bela prospekto de Germana Federacia Fervojo, kun ilustrita mapo de Germanujo kaj bildoj de vidindaĵoj.

GRAMÁTICA SINÓPTICA DE ESPERANTO

por **Mário Ritter Nunes**

Preço: Cr\$ 18,00

Abatimento para as compras de 10 ou mais exemplares.

SERVIÇO DE LIVROS DA B.E.L

MEMBROS GRADUADOS DE BEL-UEA

As nossas duas associações representativas — a nacional, Liga Brasileira de Esperanto, e a mundial, Universala Esperanto-Asocio — já registraram para 1955 os seguintes membros graduados do nosso movimento no Brasil:

NOVOS MEMBROS VITALÍCIOS

- Dr. Sila Magalhães Chaves, Rio de Janeiro, DF.
 Dr. Ernâni Dias Correia, ESPA, Porto Alegre, RS.
 Sr. Lauro João Costa, GEFVL, Santos, SP.

PATRONOS 1955

- Dr. Carlos Domingues, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 D. Zênite de Castro Santos, Teófilo Otoni, MG.

MEMBROS MANTENEDORES 1955

- Prof. Valdomiro de Abreu, Pindamonhangaba, SP.
 Dr. José Jerônimo de Albuquerque, Atalaia, AL.
 Sr. F. S. Almada, São Paulo, SP.
 Sr. Paulo Ribeiro de Almeida, Belo Horizonte, MG.
 Dr. Nid Dutra de Amorim, Maceió, AL.
 Sr. Bianor Collect de Araújo, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. Getúlio Soares de Araújo, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 D. Irani Baggi de Araújo, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. O. Augusto, Barra Mansa, RJ.
 Dr. Jonas da Costa Barbosa, Belém, PA.
 Sr. Ismael Gomes Braga, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. Elias Bondarovsky, Barra Mansa, RJ.
 Sr. Samuel Bondarovsky, Barra Mansa, RJ.
 Sr. Aníbal de Carvalho, Bebedouro, SP.

- Sr. Francisco Ferreira da Costa Filho, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. Antônio Caetano Coutinho, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Dr. Luís de Azeredo Coutinho, Belo Horizonte, MG.
 Sr. Carmênio Cruz, CEJF, Juiz de Fora, MG.
 Sr. René Estevam Deckers, Catalão, GO.
 Sr. Carlos Henrique Dionísio, ESSL, São Leopoldo, RS.
 Sr. Orville Derby A. Dutra, CEJF, Juiz de Fora, MG.
 Sr. Francisco Falcão, Belém, PA.
 Sr. José Gomes Guarnieri, Campinas, SP.
 Sr. Estevam Kolonay, CEJF, Juiz de Fora, MG.
 Dr. Jado Couto Maciel, Salvador, BA.
 Dr. Antônio de Albuquerque Maranhão, VSEG, Baturité, CE.
 Sr. Armínio de Moraes, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. José Moreira, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. Tomás Tenório Vila Nova, Recife, PE.
 Sr. Elmo Pereira Nunes, São Paulo, SP.
 Dr. Mário Ritter Nunes, NEK, Niterói, RJ.
 Sr. Francisco Oliva, Jundiá, SP.
 Sr. Santiago Oliva, São Paulo, SP.
 Sr. José Francelino de Oliveira, VSEG, Baturité, CE.
 Sr. Lauro Jorge de Oliveira, CES, Santos, SP.
 D. Maria Dolores Palmerio, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. José Pauluk, Irati, PR.
 Dr. Italo Peccioli, Jaú, SP.
 Sr. José Dias Pinto, São Caetano do Sul, SP.
 D. Ormindia Pires, Pindamonhangaba, SP.
 Sr. Hermes Pita, Salvador, BA.
 Dr. Francisco José Soares Portugal, PEA, Curitiba, PR.
 Sr. Nerino Della Rosa, Americana, SP.
 Cap. Jorge Firmino de Sant'Ana, CEJF, Juiz de Fora, MG.
 Sr. Kazim'ro Siedlecki, PEA, Curitiba, PR.
 Sr. Haroldo Pereira da Silva, Belo Horizonte, MG.
 Sr. Leônidas Silva, Bauru, SP.
 D. Marília Silva, Belo Horizonte, MG.
 Dr. Moacir Malheiros Fernandes Silva, BKE, Rio de Janeiro, DF.

- Sr. Isaltino Silveira Filho, CEJF, Juiz de Fora, MG.
 Sr. Francisco Ferreira de Sousa, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Dr. Jaime Martins de Sousa, Juazeiro, BA.
 Sr. Nelson Pereira de Sousa, Rio de Janeiro, DF.
 D. Maria Luísa de Oliveira Storage, CES, Santos, SP.
 Dr. Dilermando Teixeira, BR, Belo Horizonte, MG.
 Dr. Miguel Timponi, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Sr. António José Vaz, BKE, Rio de Janeiro, DF.
 Dr. Deoclécio Lima Verde, EGLN, Limoeiro Norte, CE.
 Sr. João Viana, Belo Horizonte, MG.
 Dr. Lincoln Martins Viana, Belo Horizonte, MG.
 D. Edith Wehrs, NEK, Niterói, RJ.
 Sr. Ari Zamora, ESPA, Porto Alegre, RS.

Desses sócios graduados 33 foram inscritos por associações filiadas: 13 pelo Brazila Klubo Esperanto, do Rio de Janeiro, 5 pelo Clube Esperantista de Juiz de Fora, 2 cada um pelo Verda Stelo Esperanta Grupo, de Baturité, Niterói Esperanto-Klubo, Centro Esperantista de Santos, Paraná Esperanto-Asocio e Esperantista Societo de Porto Alegre; 1 cada um pelo Grupo Esperantista de Limoeiro do Norte, Blua Rondo, de Belo Horizonte, Grupo Esperantista Francisco Valdomiro Lorenz, de Santos, e Esperantista Societo de São Leopoldo.

O Delegado em Belo Horizonte, Dr. Luis de Azeredo Coutinho, inscreveu 6 membros; ele mesmo, embora já membro vitalício, inscreveu-se como MS. O Delegado em Barra Mansa, Sr. O. Augusto, inscreveu 3 membros, e o Delegado em Pindamonhangaba, Prof. Valdomiro de Abreu, 2.

O Sr. António Caetano Coutinho, conquanto Membro Honorário da UEA, também se inscreveu como membro contribuinte, como sempre tem feito.

Atendendo generosamente ao apelo formulado pela Liga, vários membros já ele-

varam a sua categoria e figuram na relação acima.

A todos esses dedicados amigos, que bem compreendem a necessidade de fortalecer também financeiramente o nosso movimento, expressamos o nosso cordial agradecimento.

Ampliemos cada vez mais o nosso quadro de PATRONOS E MEMBROS MANTE-
NEDORES.

NEKROLOGO

Generalo Djalma Polli Coelho

Mortis la 18-an de Oktobro Generalo Djalma Polli Coelho, Eksprezidanto de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Dum lia prezidanteco, Esperanto daŭre ricevis de tiu grava Instituto la saman apogon jam donitan al nia afero dum la antaŭa direktantaro.

Prof. Roquette-Pinto

Prof. Edgard Roquette-Pinto, fama pioniro de grandaj entreprenoj kulturaj kaj sciencaj, mortis la 18-an de Oktobro. Fondinto de Rádio Sociedade do Rio de Janeiro. (nun Rádio Ministério da Educação e Cultura), jam en 1924 li enkondukis en tiu sendstacio kurson de Esperanto, kiun gvidis nia karmemora A. Couto Fernandes.

Prof. Lúcio Bauerfeldt

Mortis la 30-an de Oktobro Prof. Lúcio Bauerfeldt, tradukisto de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, kiu profunde sciis la anglan lingvon. Li forte interesiĝis pri Esperanto, kiun li lernis en E-kurso ĉe I.B.G.E. kaj aktive partoprenis en la XIII-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Recife, en Januaro 1952.

DIPLOMOJ

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon jenaj esperantistoj:

NORMA ELEMENTA DIPLOMO

Brazila Klubo Esperanto, Rio de Janeiro, DF:

Hersila Valverde, Octacílio Atanásio dos Santos, Ema Conde Martinez, Luís Carlos Nunes D'Angelo, Leonor Peluso de Miranda, Lila Teixeira, Amarílio de Carvalho kaj Floriano Negreiros de Vasconcelos Pessoa.

Federação Espírita Brasileira, pere de *Brazila Klubo Esperanto*, Rio de Janeiro, DF:

Djalma de Sousa Lima, Jandira Moniz Torres, Flávio Meneses, Marco António Pereira Lourenço, Maria Lígia Apezatto, Paulo Pereira kaj Sônia Pereira Lourenço.

Clube Esperantista de Juiz de Fora, Juiz de Fora, MG:

Jacir Vilar de Oliveira, Cecília Sampaio de Melo, Orlando José Lopes Júnior, Kleber Stafeld, Ítalo José de Araújo, Lourdes Fratini de Almeida, Maria Aparecida Foini, Teresa Cândida, António Francisco Foini, Lucínio da Cunha Baumgrat, Isolina Alves, Isis Faccio Marco Peres, G. Wuppschlander Lajes, Geraldo Gomes de Almeida, Octávio Busse de Azevedo, Margarida Busse de Azevedo, Maria da Conceição Gomes kaj Dirceu Borges Nogueira.

Esperanto-Klubo ê Associação Cristã de Moços, Rio de Janeiro, DF:

Acir de Magalhães Gomes, Amparo Iolanda Sabbatini, José de Arruda Leme Júnior, Nair Ataíde de Oliveira kaj Yvonne de Albuquerque Gama.

Niterói Esperanto-Klubo, Niterói, RJ:

Eneida Pontes Vieira, Dirce Bittencourt Soares Silva, Olívia Lopes da Costa,

Bethy Kingston, Marlise de Sousa Nunes, Luís Gentil, Fausto Meira de Vasconcelos, Marilina Carvalho Gentil, Célia Baiense Viana, Marlice Botelho Beleza, Magaly Lucinda da Silva Belchior, Francisco Coelho Neto, Maria Dulce Cravo Costa kaj Maria Gouveia Taranto.

Per korespondado:

António Brito, Celina de Assis Cordeiro, Elísio da Rocha Dorea, Enock Spinola Teixeira, Ernestina Gusmão Viana, Esdras Tosta, Estela de Lourdes Martins Lima, Humberto Leal Vieira kaj Zilka Maria Pinto, *Vitória da Conquista, Baía*. Edson A. da Silva, *Barra do Pirai, Rio de Janeiro*. José Pauluk, *Irati, Paraná*. Jaime Pereira, *Brusque, Santa Catarina*. Jaime Ferreira de Albuquerque, *Piraçununga, São Paulo*. Antonina Xavier Oliveira, *Passo Fundo, Rio Grande do Sul*. Gersi Alfredo Bays, *União da Vitória, Paraná*. Ivete Costa Rosa, *Rio Preto, Minas Gerais*. Ismar de Oliveira Carneiro, *Januária, Minas Gerais*. Brumel Augusto Monteiro, *São Paulo, S.P.* Vanda Dall'Oca, *Araçatuba, São Paulo*. António Alves de Carvalho, *Salvador, Baía*. Cláudia Techio, *São Paulo, S.P.* Irmã Maria Isaías do Menino Jesus, *Goiânia, Goiás*.

NORMA SUPERA DIPLOMO

Brazila Klubo-Esperanto, Rio de Janeiro, DF:

Aylton de Lima Rocha.

Per korespondado:

Manuel Borges dos Santos, *Muritiba, Baía*. Pedro Real, *União da Vitória, Paraná*. João Gonçalves de Faria e Sousa, *Bueno Brandão, Minas Gerais*.

**BONVOLU PAGI VIAN NUNJARAN
KOTIZON !**